

EKO 2024

TRA LA
MONDO
IRAS FORTA
VOKO

Numero 2024:09, februaro 20. Pezo: Word 40, PDF 310 KB, alk.53 KB. Sume 400 KB

Traf-ĝirafa promenado

Jen aro da longkoluloj: evidente por ajna dediĉita esperantisto, ili survojas al Aruŝa. Sendepende de la longeco de via kolo, celu ankaŭ vi al Aruŝa. Tio estas la temo de nia nuna artiKOLO.



La foton mi dankas al Barbara Pietrzak el Pollando

Aldonu statistikon? 362

Akademio Internacia de la Sciencoj

Detala raporto pri la stato de AIS dum la lastaj jaroj legeblas en mia jarfina cirkulero (decembro 2023) en la retejo de AIS <http://www.ais-sanmarino.org/index.html>.

La novaĵoj pri AIS kaj ĝiaj sesioj (IKU, VK, IVU, SUS) foje aperas en mia monata rubriko "Fake, Science, Profesie tra la mondo" en la revuo *Esperanto*. Ekzemple en la januara aperis raporto pri la prelegoj de IKU-AIS dum la Virtuala Kongreso. Informoj pri IVU dum Luminesk' aperis en la januara kaj februara numeroj kaj Alvoko por SUS-40 same aperis en tiu februara, kun kelkaj pli ĝeneralaj informoj pri la agado de AIS en la lastaj jaroj:

La 40-a SUS okazos dum la Kongreso en Strasburgo

Ekde 2017, post interrompo de ses jaroj denove okazas ĉiujare la Scienca Universitata Sesio (SUS) de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Sub la prezidanteco de Amri Wandel ili tamen ekhavis diferencon karakteron de la antaŭaj: anstataŭ memstara aranĝo ili fariĝis kurs- kaj preleg-serio kadre de aliaj, pli grandaj internaciaj Eo-aranĝoj, kiel la Itala Kongreso, la Germana Kongreso kaj BET. Ĉi-jare denove okazos SUS, jam la 40-a, kadre de la Eŭropa Kongreso en Strasburgo maje. <https://www.esperanto.de/eo/enhavo/deutscher-esperanto-kongress-germana-esperanto-kongreso-2024>. Proponojn por kursoj aŭ prelegoj bv. sendi al <amri@huji.ac.il> **ĝis la fino de marto**.

En la aprila numero aperos la programo de AIS-IKU okazonta dum la UK en Tanzanio. La ĉi-jara rikolto de IKU-proponoj estis kontentiga, konsidere ke ĝi okazos en Afriko: 17 proponoj, el ili 14 mi konsideris taŭgaj por IKU-AIS kaj transdonis al la IKU-komisiono por prijuĝo. El tiuj kvar estas ankaŭ por AIS-kursoj.

Prof. Amri Wandel, Vicprezidanto de UEA, prezidanto de Akademio Internacia de la Sciencoj

Impertinenta komento SMG: En UEA estas ses aliĝintaj fakaj asocioj: instruistoj, medicinistoj, fervojistoj, blinduloj kaj komercistoj. Kvin aktivas, unu mortadas: ISAE – la sciencistoj. Por UEA, estas skandalo kaj honto, kiel ili silente akceptas tiun multjaran dormon de aliĝinta faka asocio. Neniel temas pri manko de sciencistoj kaj sciencemuloj en nia rondo. Mia defio al AIS – simple transprenu la mortan kadavron de ISAE kaj spiru en ĝin vivon! Mia defio al UEA: aŭ revivigu la sciencistan fakan asocion, aŭ definitive malaligu ĝin.

Faktoj pri la Esperanto-movado en Albanio

SMG: En aprilo ni okazigos AMO-seminaron en Albanio, do indas koni iom pli detale pri ĝiaj malfacila historio kaj Eo-movado. Jen koncizigo de teksto de Bardhyl Selimi:

“Unuafoje Esperanto estas menciita en Albanio en 1902, de la albana eminentulo Mid’hat Frashëri, per artikolo publikigita en la revuo “Drita”, eldonita en Sofio-Bulgario, ĉar Albanio tiam restis sub la otomana rego. La artikolo eksplikas la strukturon de la lingvo kaj konsideras Esperanton taŭga komunikilo inter la nacioj. Aperis esperantistoj inter la intelektuloj de Shkodër, nordoriente de Albanio, el kiuj de la pastro Dom Lazaro Shantoja en 1907, la fratoj Koliqi (Wilhelm kaj Mikel), Zef Kakarriqi, ĉiuj katolikoj. En la sama urbo aktivis, post la jaroj 1920, Cuk Simoni, (katoliko) tradukisto kaj eldonisto, kiu kompilis originale en Esperanto historieton pri la albana nacia heroo Gjergj Kastrioti-Skënderbej (1403-1468). La libro titolita *Heroo de Albanujo* eldoniĝis en la jaro 1929. Samtempe aktivis aliaj albanoj islamaj, kiel inĝ. Çefo Fico, d-ro Hamdi Sulçebe, la instruisto Janko Pali (ortodoksulo) el la plejsuda vilaĝo Qeparo.



Post la Dua Mondmilito, sub la komunista reĝimo, aktivis la instruisto Zef Mjeda (katoliko, el Shkodër), Vasil Pistoli (ortodoksulo) el Tirana, kaj dekoj da aliaj, precipe

en Tirana. Pro la forta cenzuro, ne menciindas notinda agado, krom la kompilado de libreto pri la lingvo, uzata en la universitatoj, kaj tradukoj de poemoj.

La jaro 1991 (kiam ŝanĝiĝis la politika sistemo) notis la fondiĝon de Albana Esperanto-Asocio (agnoskita de la Tirana juĝejo en 2013) kaj poste ties filioj en Tirana, Shkodër, Kukës, Lezhë, Durrës, Gjirokastrë, Pogradec, Vlorë kaj Korçë. Tuj oni starigis lernokursojn en la diversaj lernejoj niveloj. Estis eldonitaj almenaŭ tri lernolibroj, ekaperis la revueto *Albana esperantisto*, okazis intervjuoj en ŝtataj radio kaj televido, stariĝis rektaj ligoj kun eksterlandaj esperantistoj.

Ĉio daŭris glate ĝis la jaro 2010, kiam albanoj rajtis moviĝi senpage tra la ŝengena zono. Ĝis tiam Esperanto estis alloga kiel rimedo por trovi laborpostenojn eksterlande. La ŝtato ne favoris la disvastiĝon de Esperanto, sub la premo de la lingvo-politiko kiu proferis la ĝisnunajn 'grandajn lingvojn' (la angla, la germana, la franca). Dumtempe, la membraro maljuniĝis, sekve ankaŭ la agado. Tamen post 2010 ni baraktadis por teni viva nian movadon per la tradukado kaj eldonado de albanaj verkistoj. Ĉiun duan monaton aperas nia dulingva bulteno, utiligante la sociajn retojn por konatigi Esperanton. Jus okazas la elektoj por la nova estraro, kaj tio rezultis la enoficigo de pli juna teamo.

ENA plezuro

En 2013 estis fondita la fakgrupo 'Esperanto-Numismatika Asocio' (ENA) kun la revuo *Esperanta Numismatiko*. La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke Esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.



La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol ses jaroj ĝis 155 individuaj membroj kaj 25 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo. Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas aliĝi senpage: sufiĉas respondi: "Mi konsentas aliĝi". Krome la perreta revuo estas senkosta. Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas elŝuti la aperintajn numerojn, sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (kvarfoje jare).

Se vi dezirus pliajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be

UEA senĉese aktivas ĉe UN kaj EKOSOK

La 31-an de januaro, Francis Hult, mia kolego kiel reprezentanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj, intervenis en debato pri la prioritatoj de la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN (EKOSOK), la ĉefa organo de UN kiu decidas pri la substanca programo de UN kaj ĝiaj agentejoj. EKOSOK estas tiu unuo de UN per kiu

neregistaraj organizoj estas rekonataj de UN: niaj konsultaj rilatoj kun UN fontas el iama decido de EKOSOK.

Tio okazis en plena laborsesio de EKOSOK, kun altnivela diplomata partopreno. La parolado estis do aŭdata de Konstantaj Re prezentantoj (ambasadoroj) de la membraj ŝtatoj, kaj altaj funkciuloj de UN. La sesio fokusiĝis je substancia diskutado de UN-prioritatoj, precipe engaĝiĝo kun la rezultoj de la Altnivela Politika Forumo (APF) de 2023 kaj kunordigo de la APF de 2024. Temis pri unika okazo konsciigi la Konsilion pri lingvaj rajtoj en la kunteksto de la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo. Ĝi antaŭenigis la tagordon de la Komitato de Neregistaraj Organizoj pri Lingvoj, kiun prezidas prof. Hult kaj kies vicprezidanto mi estas.

La interveno antaŭenigas la atentigon de UEA pri lingvaj rajtoj – atentigadon ligitan lastatempe al la 75-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, al la kongresa temo de la UK en Torino 2023. Vi trovos la tekston de la interveno al kroĉite:

Humprey Tonkin, reprezentanto de UEA ĉe UN.

//alkroĉajho. Forigu la anglan.

Laste aperis ‘La Danĝera Lingvo’ en la franca

La retejo de UEA ĉiam montras la kovrilbildon kaj informojn pri la lastatempaj libroj kaj aliaj eroj akireblaj en la Libroservo de UEA. Eblas peti de UEA, ke oni sendu al vi la sciigojn per retpoŝto. Vizitu tion ĉe: <https://uea.org/aktuale/ls>. El la nuna enhavo eblas konstati, ke la renoma verko de la historiisto Ulrich Lins nun aperas france. Plie aperis ĉe eldonejo *Fonto* la ‘Somermoznoka sonĝo’ de Ŝekspiro kaj de eldonejo *Mondial* la Beletra Almanako numero 47 kaj ‘La Nepo de Marina’, nova verko de la sveda verkisto Sten Johansson.

Memore al Wim Jansen

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis novaj eroj ĉe Novaĵoj. La 2-an de februaro 2024 forpasis profesoro Wim Jansen, nederlanda esperantisto, lingvisto, (1948-2024), emerita profesoro pri Interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo. Kolego Jansen ne nur en sia oficperiodo en Amsterdamo, sed ankaŭ poste plurfoje kunlaboris kun nia redaktoro kun la celo kunordigi internaciskale la enkondukon de la fako. Legu ĉe: <https://edukado.net/novajhoj?id=901>

===== vortoj: 1150 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komuniko iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500

rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ce>gmail.com>.